

Intervjuo kun Walter Zelazny pri Pola Studenta Esperanto-Komitato

Radioprelego de Claude GACOND, SRI-843/329, 1979 decembro 06 kaj 08

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-50->

[/Radioprelego_843_SRI_329_1979_12_06_08_Intervjuo_kun_Walter_Zelazny_pri_Pola_Studenta_Esperanto_Komitato.mp](http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-50-/Radioprelego_843_SRI_329_1979_12_06_08_Intervjuo_kun_Walter_Zelazny_pri_Pola_Studenta_Esperanto_Komitato.mp3)

3

Cl.- Vi aŭdas elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolas Claude Gacond. Dum du semajnoj pola studento kaj pli kaj pli art-forĝisto, kiu estas membro de la komitato de Pola Studenta Esperanto-Komitato restadis en Svislando. Li nomiĝas Walter Zelazny kaj venis interalie por intimiĝi kun la aktiveco de la esperanto-organizaĵoj, kies sidejo troviĝas en La Chaux-de-Fonds. Tio estas Centro de dokumantado kaj studo pri internacia lingvo (CDELI), Kultura Centro Esperantista (KCE) kaj Literatura Foiro, kies pola kunlaboranto li fakte estas. Antaŭ ol li forveturu Pollanden, ni profitu peti al li diri al ni kelkajn vortojn pri la aktiveco poresperanta, kiun li plenumas en Pollando en la kadro de Pola Studenta Esperanto-Komitato. Sinjoro Walter Zelazny, kiel kaj kiam naskiĝis la aktiveco de Pola Studenta Esperanto-Komitato?

WZ.- Oni povas diri ke antaŭ ok jaroj fakte Wladislav Stef (?) estis la pioniro de studenta esperanto-agado. La Socialisma Asocio de Polaj Studentoj donis al ni ĉiujn eblecojn agadi por esperanto kadre de SAPS (Socialisma Asocio de Polaj Studentoj), tielmaniere ekstartis PSEK: Pola Studenta Esperanto-Komitato. Antaŭ ok jaroj, la unuan fojon, Esperanto-Komitato de Polaj Studentoj partoprenis TEJO-kongreson en Sarajevo. Tio estis la komenco.

Cl.- Kaj ĉu Pola Studenta Esperanto-Komitato agadas en kunlaboro kun Pola Esperanto-Asocio?

WZ.- Pola Studenta Esperanto-Komitato estas malfermita por ĉiuj esperantaj aktivoj. Tamen, ni agadas kadre de Socialisma Asocio de Polaj Studentoj. Tio signifas, ke ni estas la esperanta mano, se oni povas tiel diri, de Socialisma Asocio de Polaj Studentoj. Tio signifas samtempe, ke unu el la plej fortaj surmonde esperanto-studentaj organizoj instaliĝis en ne-esperanta organizo, kiu samtempe devis akcepti esperanton kaj esperantan agadon kadre de sia sino.

Cl.- Kiel evoluis la aktiveco de Pola Studenta Esperanto-Komitato dum tiuj ok jaroj ?

WZ.- Unue mi devas diri ke ni ricevis ĉiujn eblecojn profiti mone, profiti per eblecoj de Studenta Asocio de Polaj Studentoj, kaj komenco estis kiel simple ĉe ĉiu organizo, unue aktivi, trovi tiujn kiuj interesiĝas pri esperanto. Ni sukcesis tion fari kaj poste ni orientiĝis, ke la plej ĝusta agado estos la scienca agado. Tiu agado kiu mankis kadre de Universala Esperanto-Asocio-institucioj. Do ni unue celis la sciencon kaj kulturan agadon. Al tio ni ricevis la financon apogon. Kaj poste ni specialiĝis kelkajn fakojn, kiel ekzemple studenta interlingvistika seminario, seminarioj pri la paco kaj tiel plu.

Cl.- Kio estas la plej originala trajto de la aktiveco de Pola Studenta Esperanto-Komitato distingante ĝin vere de la tradicia esperanto-movado?

WZ.- Do ĝuste nia orientiĝo al scienca kaj kulturpolitika agado estis la plej grava diferenco inter la tradicia Movado kaj la nia Movado. Nia movado celis trairi per tuta studenta medio en Pollando. Nia trajto mi povas diri estas jena: ni pristudis kune kun kvinmil da polaj studentoj la interlingvistikan demandaron, kio signifas, ke la tuta generacio miaj-aĝaj studentoj en Pollando,

Cl.- Do, tridek jaraj, ĉu ne?

WZ.- nun tridek jaraj, fakte, renkontis kun internacia problemo pri la lingvo, pri esperanto, pri interlingvistiko. Tio signifas, ke ni faris bonan grundon por la homoj, kiuj estonte estos ĉu partiaj, ĉu politikaj, ĉu kulturaj, ĉu sciencaj agantoj. Tio estas la unua trajto. La dua trajto estas, ke ni orientiĝis pri la scienca kaj kultura agado. Estas famaj niaj studentaj internaciaj seminarioj pri interlingvistiko, tiel nomataj SIS. La oka venos en 1980a jaro, do signifas ke kadre de studenta scienca movado ni atingis la nivelon ne konatan por esperantujo. Kaj la tria trajto estas la kultura agado. Tio signifas, ke ni kreas tielnomatan esperantan alternativon en kulturo. Tio signifas samtempe ke ni estas la movado avangarda kadre de junularo ĉar ni ne iris la tradicion movadon, kiu ĝis nun varbis por TEJO. Ni nune opinias, ke varbado estas same grava afero, tamen la dispono de ĉi tiu kio ekzistas por fariĝi kvalite pli grava estas pli grava afero ol la alia. Kaj en Socialisma Asocio de Polaj Studentoj tion ni povas fari.

Cl.- Kio, s-ro Walter Zelazny, estas la estonteco de studenta organizo kiel Pola Studenta Esperanto-Komitato? Ĉu ne ekzistas danĝero ke subite ĉiuj membroj de la gvida komitato forlasu la aktivecon por enoficiĝi en la profesian vivon ?

WZ.- Estas tiu danĝero kaj lige kun tiu danĝero mi venis al Svislando. Ni kiel PSEK bezonas simple la aliancon. Bonan aliancon. Ĉi tiu alianco devas nur okazi kadre de scienca kulturpolitika agado. Tion mi trovas en Svislando, feliĉe, kaj mi pensas, ke la estonto de PSEK devas esti ligita kun iu scienca institucio en esperantujo. Sendube, Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) en La Chaux-de-Fonds estas tiu alianco, kiu garantias ankaŭ interalie la estontecon por PSEK.

Cl.- Sed, do, se la gvidantoj de Pola Studenta Esperanto-Komitato maljuniĝas kaj fariĝas pli aĝaj ol studentoj, kio okazos ? Ĉu vi formos novan organizon ?

WZ.- Ni havas sufiĉe bonan pli junan generacion pri kiu ni devas zorgi. Kaj mi pensas, ke tiu trairo de malnovaj aktivuloj kiel ekzemple Stanislaw Mach, Rychard Rokicki, Jerzy Leyk, Edward Malewich sufiche bone zorgos pri la nova generacio de PSEK-anoj. Kaj ni havas ĉirilate la bonan grundon.

Cl.- Kelkaj opinias, ke esperanton nuntempe karakterizas novaj fenomenoj. Kion vi opinias tiurilate vi, kiu laboris ĉefe ekster la kadro de la tradicia movado de esperanto-fako de politika organizo pola grupiganta la studentojn.

WZ.- Mi opinias, ke la estonteco de esperanto estas en ĉi tiuj grupoj de esperantistoj, kiuj fakte troviĝas ekster la tradicia movado. Mi ne vidas la eblecon progresi kadre de la tradicia movado. Tradicia movado, movado de UEA devas esti konservita kiel la jura, ni diru, punkto de nia esperanta vivo. Tamen, kiel la kultura, kiel la alia, ne eblas. Por ekzemplo : Stanislaw Mach, Rychard Rokicki, ili magistriĝis pri la internacia lingvo. Jerzy Leyk doktoriĝis pri la internacia lingvo, pri lingvo de komputiloj, kaj tiel plu. Edward Malevich magistriĝis ĉe la Varsovia Universitato pri metodiko instrui fremdajn lingvojn kaj esperanton. Tiuj nomoj ekzemple, mi aldone, kiu aktivas en studenta asocio, do ĉi tiujn atingojn ne eblis fari kadre de tradicia movado. Ni devis foriri.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond intervjuis la polon Walter Zelazny pri la laboro de Pola Studenta Esperanto-Komitato. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), oktobro 2013*